

La Krokodil'




Informbulteno de Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo
1 rue Jean Aillet, 31000 Toulouse
tel/fax 05 61 25 55 77 courriel : esperanto.toulouse@free.fr
<http://esperanto.toulouse.free.fr/>

N° 23 januaro 2004

enhavo	p.
kalendaro	1
Tuluza koruso	1
Fête de l'espéranto	2
Sept diplômés	2
Conférence d'une Lituanienne	3
Qui est Grazyna Opulskienė ?	3
Le Bâton à Palabre	5
Café philo en espéranto	5
Repas Tchatche et Cours Express	6
Tuluza Teatra Trupo	6
Les voyages de l'été...	6
L'espéranto à la radio	7
Pourquoi adhérer à une association ?	8
Des nouvelles du voyage de Pierre-Yves et Elodie	8
...et de M. PENG (Chine)	9
Korespondpetoj	9

Kalendaro

mar 6 januaro Début du Cours EXPRESS
ven 9 januaro manĝo-klaĉo / Repas-tchatche
lun 12 januaro prelego de Grazina, el Litovio (9 rue Marengo)
mer 14 januaro korusa provkanto (15 rue de Thionville)
dim 18 januaro kunveno pri eŭropa baloto, 12 Av.de l'Hers, 10a30
h. organizita de Thierry Saladin - info : Michel Lafosse 0561241445
ĵaŭ 29 januaro Café philo en espéranto chez Hélène et J.R.
FUNEL 15 rue de Thionville
mer 28 januaro Korusa provkanto
ven 6 februaro manĝo-klaĉo / repas-tchatche
mer 11 februaro Korusa provkanto
mer 25 februaro Korusa provkanto
28 feb–6 marto Koruso-staĝo kaj lingva kurso por komencantoj
09300 Montferrier Info :(33) (0)5 61 60 18 95 aŭ :
claud.fressonnet@wanadoo.fr



Koruso en esperanto

Sub gvido de Christian Lavarenne, eta grupo komencis provkanti polifoniajn kantojn la 17an de decembro. Ni estis malmultaj kaj kantis unu ĉenkanton, trivoĉan kanton *Pri la vino*, kaj kvarvoĉe la tradician alvok-kanton de

la internacia ĥoro dum la UK-oj, *Kuniĝu per nia kant'*.

La venonta provkantado okazos merkredon la 14an de januaro, 18h., 15 rue de Thionville Ni lernos tri aliajn plurvoĉajn kantojn.

FÊTE DE L'ESPERANTO en décembre



Venant de 8 départements et même de Catalogne, une centaine d'espérantistes se sont réunis le 7 décembre à Toulouse, pour fêter l'anniversaire de l'initiateur de la langue internationale, Lejzer Ludvik Zamenhof, né le 15 décembre 1859.

A l'invitation de Tuluza Esperanto-Fervojistoj (TEF), d'Esperanto Kultur Centro (EKC), d'Esperanto Midi-Pyrénées et d'Eurokka, cette journée s'est entièrement déroulée dans les salles d'un centre sportif de la SNCF.

A 10 h. a eu lieu l'Assemblée générale de l'association Esp.-Midi-Pyrénées. (voir le compte-rendu ci-dessous)

Puis un repas, magistralement préparé par Daniel Maynau, Majid et leur équipe de bénévoles, a été servi aux 78 convives, répartis autour de tables de 8 ou 12.

Après le café, le spectacle a commencé rapidement, afin de ne pas prendre de retard.

En première partie, l'ensemble formé par les élèves violonistes et leur professeur, notre ami Bogumił Włodarski, accompagnés d'un clavier et un violoncelle, nous a

impressionnés par leurs interprétations de pièces aussi variées qu'une gavotte de J.S. Bach, de la musique tzigane, La Vie en Rose, et même du jazz !

Flavie Audibert a présenté un court mime *Les trois âges de la vie*, très émouvant, et une improvisation de danse sur une musique de ... avant que notre Tuluza Teatra Trupo (TTT) ne présente la pièce de Max Maurey, *La Délaissée*, dans l'adaptation en espéranto de Rikardo Cash : *Forlasita*.

Après un entracte pour discuter et visiter le libro-servo, très fourni, de Jorgos, le clou du spectacle s'appelait *Kaj Tiel Plu*. Ce groupe catalan, composé de guitare, violon, flûtes, percussions et voix, spécialisé dans la musique traditionnelle, nous a ravi par ses chansons catalanes, occitanes, castillane et sépharades. Les applaudissements fournis du public n'ont pas laissé partir les artistes sans deux bis.

Deux nouveautés, par rapport aux années précédentes : des nouveaux espérantistes (un an d'étude) ont participé, et une proportion plus importante de jeunes était visible.

Alors l'année prochaine, on continue ? Dans quelle ville ?



7 nouveaux diplômés!

Les 13 et 14 décembre dernier ont eu lieu des examens du 1^{er} et du 2^{ème} degré (Atesto pri Lernado et Atesto pri praktika lernado), dans les locaux des Cheminots pour l'Espéranto, à Toulouse.

Sept candidats ont subi les épreuves, et tous ont réussi !

Voici les noms des heureux lauréats :


Atesto pri lernado :

Gérard Imhoff, Christophe Chazarein
Christian Pinard,

Atesto pri praktika lernado :

Christian Pinard, Christophe Chazarein,
Robin Béteau, Sylvie Roques, Pierre Junyent,
Gustave Guillen

Une conférence sur la Lituanie, par GRAŽINA OPULSKIENĖ



Dans quelques mois à peine, la Lituanie fera partie de l'Union européenne.

Lundi 12 janvier, Gražina, ingénieur dans une usine, puis bibliothécaire et professeur d'espéranto au lycée, viendra nous parler de son pays et de la vie des Lituanien.

Venez l'écouter, et n'hésitez pas à inviter famille et amis, car la conférence et la discussion seront traduits en français.

Direction Régionale SNCF, 9 rue Marengo,
Bât. Restaurant d'entreprise, Salle Rez-de
Chaussée - **lundi 12 janvier à 20 h.30.**

Entrée gratuite.

Qui est Gražina Opulskienė ? / Kiu estas Gražina Opulskienė ?

Gražina sendis al ni ĉi tiun tekston, por prepari la renkontiĝon.

Mi naskiĝis la 1an de decembro 1958 en urbo Mazeikiai, nordokcidente de Litovio. Tio estis malgranda urbeto, tiam pli simila al vilaĝo ol al urbo, sed rapide kreskis en sepdekaj jaroj pro kelkaj nove konstruitaj fabrikoj. Miaj gepatroj laboris kiel inĝenieroj en la fabriko kiu produktadis motorojn por lavmaŝinoj kaj mi havis la infanecon kiel ĉiuj infanoj de tiu epoko en Sovetunio. Tio signifas, ke estis multe da ruĝa koloro sur stratoj kaj multe da griza kaj bruna en la vivo. Mi tamen estis feliĉa, ĉar mi tute ne konsciis, ke povas ankaŭ ekzisti alia vivo.

En la jaro 1965 mi komencis lernadon en lernejo. En 1970, kiam mi estis en la 7a klaso mi rimarkis, ke mia samklasanino parkeraĉas iujn strangajn vortojn kiuj laŭ mi tre bele sonis. Al mia demando kio estas tio, ŝi rakontis pri Esperanto. Mi tuj havis la emon lerni tiun lingvon kaj petis ŝin ekscii, ĉu instruisto akceptus ankaŭ min. Post kelkaj tagoj mia amikino diris, ke, bedaŭrinde, la E-rondeto estas organizita nur por infanoj de laboristoj de la fabriko, en kiu miaj gepatroj ne laboris. Tamen ekde tiam mi ekinteresiĝis pri Esperanto, kaj se estis okazo aĉetis librojn kaj vortarojn, nur la okazo ne estis oftaj, ja dum

soveta tempo Esperanto estis “danĝera lingvo”. Kaj mi neniam estis vere diligenta lernantino, pro tio, eĉ posedante kelkajn librojn kaj vortaron, mi neniam klopodis memstare lerni lingvon, nur daŭre planis, ke foje mi tion faros.

Mi ricevis la maturatestaton en la jaro 1976 kaj tuj eklaboris en la sama fabriko kie daŭre laboris mia patrino. En la jaro 1977 mi komencis studi en teknika lernejo la fakon de la prilaborado de metaloj, ne pro la speciala intereso pri metaloj, sed pro la fakto, ke tio estis sola lernejo kie mi povis studi ne forlasante mian urbon kaj mi sciis, ke diplomo de tiu lernejo helpus al mi ricevi pli bonan pozicion en fabriko.

En 1978 mi edziniĝis al mia kolego kaj samkursano kaj studojn ni akordigis kun laboro, ĉar eblis studi en la vespera fako. Printempe de la jaro 1980 naskiĝis nia filo. Post unu jaro, en 1981, ankaŭ printempe mi finis la studojn kaj diplomiĝis kiel teknikisto-teknologo pri la prilaboro de metaloj. Aŭtune de le sama jaro naskiĝis nia filino. En tiuj jaroj ni kun edzo vere havis neimageble aktivan vivon, ĉar ambaŭ estis ankaŭ aktivuloj en sindikato (kiel eblas esti aktivulo en sovieta sindikato) kaj en komsomolo, plus mia edzo apartenis al kelkaj teamoj de korbopilistoj kaj mi partoprenis en danckrondo de popolaj dancoj. Ni klopodis vojaĝi ĉiam kiam eblis tra vere vidinda Sovetunio, ni ambaŭ sukcesis kelkfoje viziti eksterlandon kaj ni tiam devis multe da tempo dediĉi al vicoj en vendejoj, ni estis junaj, do ofte havis gastojn kaj ofte gastis... se nun mi memoras tiun periodon, ŝajnas al mi ke ni neniam ĝisate dormis kaj de ĉiuj eblaj deficitoj en Sovetunio la plej granda por mi estis deficiito de tempo.

En la jaro 1990 mi hazarde vidis la anonceton pri la Esperanto-kurso en loka gazeto de mia urbo. Mi tuj aliĝis kaj jam post unuaj lecionoj konstatis, ke neniam ankoraŭ en mia vivo mi lernis ion kun tia plezuro kaj entuziasmo kiel Esperanton. Tamen post la fino de la kurso, mi iom post iom forlasis la regulan lernadon: kelkfoje mi skribis leterojn al Ĉinio kaj Francio kie mi havis korespondamikojn, kelkfoje mi iomete legis, ĉefe nur post hazardaj renkontiĝoj kun mia instruistino kaj sugestita de ŝi ne forgesi la lingvon.

En printempo de 1992, dum unu tia renkontiĝo, ŝi rakontis al mi pri SAT kongreso kiu devos okazi en Kaunas, urbo de Litovio, kaj ŝi proponis, ke ni kune venu tien kaj mi povu en realeco uzi Esperanton. Tiamaniere mi venis al mia unua SAT kongreso, fakte kun

ideo, ke mi povos paroli ruse kun ekssovetanoj kaj observi ĉu vere Esperanto funkcias.

Mia unua kongreso estis ege sukcesa, ĉar mi trafis al la rondo de bonaj parolantoj, miaj kongresaj amikoj havis paciencon komuniki kun la komencantino kaj inspiris min daŭrigi la lernadon de la lingvo. Specialan lokon en tio okupas sperta esperantisto Max Hollinger (Aŭstrio) kiu proponis al mi ĉiutage promeni kun li kaj paroli. Ni povis kompreni nin nur en Esperanto, alian komunan lingvon ni ne havis. Je la fino de la kongreso Max proponis al mi daŭrigi la lernadon per korespondado.

Pro malbonaj rilatoj kun Rusio, nia fabriko ne plu ricevadis materialojn kaj mendojn kaj en 1992 bankrotis, mi restis senlabora kaj tiun tempon mi uzis por studi anglan lingvon, iom germanan, stiradon de aŭtomobilo kaj, kompreneble, mi finfine havis tempon por Esperanto. Kaj tiu jaro estis tre bela ankaŭ por miaj gefiloj kiuj povis reveninte de lernejo trovi la patrinon hejme. Tio estis tre malfacilaj jaroj en senco ke ĉio mankis, ke ankaŭ mia edzo ne ricevadis stabile salajron kaj por nutri familion ni bredis porkojn, kuniklojn, kokinojn, havis kelkajn ĝardenojn kaj ĉiujn tiujn laborojn mi malamegis. Sen espero kaj esperanto certe mi estus kaptinta tre modernan malsanon: depresion. Ĉion elteni estis multe pli facile ricevante leterojn de geamikoj, revante pri SAT kongresoj, povante refoje viziti esperantistojn en iliaj landoj, akceptante esperantistojn en mia “fino de la mondo”. Ekde 1992 mi partoprenis en ĉiuj SAT kongresoj, ekde 1997 mi estas la perantino por SAT en Litovio.

Aŭtune de 1993a jaro mi ricevis proponon instrui Esperanton kiel ne devigan studobjekton en la gimnazio kaj ĝis nun mi daŭrigas tiun laboron. Parton de tago mi laboras en lernejo kiel bibliotekistino. Tiamaniere, dank al Esperanto, mi ne restis longe senlabora post la fermo de la fabriko.

Ĉiujare mi havas 20 - 30 lernantojn en du grupoj kaj mi instruas ĉefe uzante rektan metodon de A. Cseh. Pli bone mi konatiĝis kun tiu metodo dank al mia amikino, fama instruistino Ewa Bondar (Pollando). En la jaro 1994, aprile, mi gastis ĉe ŝi hejme, poste ni triope kun japanino Hiroko Sugitani faris la rondvojaĝon tra centroj de Esperanto en Pollando: Białystok, Bydgoszcz., Krakovo kaj ni partoprenis tie en diversaj renkontiĝoj de esperantistoj. Dum la sama vojaĝo mi ankaŭ gastis en Varsovio ĉe fama esperantisto, redaktoro kaj aŭtoro de multaj E-filmoj Roman Dobrzyński. Tiu gastado estis speciale interesa, ĉar tiam Roman kun teamo produktis la filmon por instruado “Mazi en Gondolando”

kaj mi povis konatiĝi kun famaj polaj esperantistoj. Post tiu vojaĝo mi decidis daŭre interesiĝi pri la instruado de Esperanto kaj en la jaro 1995 mi faris A - seminarion, en la jaro 1999 B kaj C seminariojn kaj aŭguste de la jaro 1999 mi ricevis la ateston de Internacia Esperanto Instituto (Hago) kaj povas instrui nian lingvon laŭ Cseh - metodo. Printempe de 2000 jaro la Internacia Esperanto Instituto proponis al mi gvidi kurson en Zagreba UK laŭ Cseh metodo por komencantoj.

Fine de la jaro 1995 germana esperantistino Nora Caragea invitis min al Internacia Festivalo en germana urbo Würzburg. Festivalo okazas ekde 27a de decembro ĝis la 3a de januaro ĉiam en alia urbo de Germanio kaj partoprenas ĝin 150 - 200 esperantistoj el la 21 -26 landoj. Dum mia unua festivalo mi prelegis pri la litovaj ritoj kaj tradicioj okaze de la jarfinaj festoj kaj post tiu prelego mi ricevis inviton fari kelkajn prelegojn pri Litovio en la Kultura Semajnofino de Saarlanda Esperanta ligo (Homburgo, Germanio). Aprile de la jaro 1997 mi estis kiel ĉefprelegantino en tiu semajnofino. Teksto de

prelego farita en Würzburg estis publikita en revuo "Sennaciulo" de la jaro 1997 kaj homburgaj prelegoj estas surbendigitaj kaj distribuataj de Saarlanda Esperanto Ligo. En Internaciaj Festivaloj mi partoprenas regule kaj nun jam atendas la okan por mi IFon en urbo Kiel.

En 1999 mi la unuan fojon partoprenis en la UK en Berlin kaj en la konferenco de ILEI en Karlovy Vary. En la jaraj kongresoj de Litova E- asocio mi konstante partoprenas ekde jaro 1992. Ekde 1999 mi estas en la estraro de LEA. Kelkfoje miaj artikoloj estis publikigitaj en "Litova stelo", "Sennaciulo", "Mankanta ĉenero" (Pollando), "La informilo" (Francio), aperis artikoloj en "Sennacieca Revuo" kaj "Internacia Pedagogia Revuo".

En januaro de tiu-ĉi jaro, mi estis invitita kiel instruistino al Aŭstralia somerkursaro kaj tie gvidis kurson por du niveloj.

Pro partopreno en diversaj E-aranĝoj kaj pro personaj kontaktoj mi vizitis 16 landojn.

Mi neniam apartenis al iu politika partio kaj mi ne estas religiema.

Le Bâton à palabre

Café « philosophique » 15 rue de Thionville. Le 20 décembre dernier, Hélène et Jean-René Funel ont fêté l'inauguration de leur Café Philo, *le Bâton à Palabre*, qu'ils ont ouvert au centre ville, 15 rue de Thionville.

A cette manifestation très sympathique étaient conviés toutes les associations partenaires du Café, Amis de la Terre, Système d'Echanges Locaux, associations

écologistes et féministes, et bien sûr espérantistes. Il y a avait tant de monde que tous n'ont pas pu entrer, heureusement certains n'ont fait que passer (comme Flo et sa famille par exemple) libérant ainsi de la place...

Merci à Hélène et J.René pour cette soirée très conviviale, et bon vent au *Bâton à Palabre*.

Café philo en espéranto

Jeudi 29 janvier, à 20 h. la philosophie se fera en espéranto... au 15 rue de Thionville.

En effet, Hélène a décidé qu'une fois pas mois, le dernier jeudi du mois, serait réservé à des discussions sur un thème *en espéranto*.

La premier thème, le jeudi 29 janvier, sera : l'espéranto peut-il être un parti politique ?

Préparez donc vos arguments et votre vocabulaire, et à 20 h venez discuter avec nous.

Consommation obligatoire : 5 € (vin bio et tapas).

Manĝo-klaĉo / Repas Tchatche

Les prochains repas-tchatche en espéranto auront lieu à notre local (1 rue Jean Aillet) le vendredi 9 janvier, puis le 6 février, à 20 H.

Chacun apporte quelque chose, et on partage, tout en bavardant à bâtons rompus...

Cours express

Mardi 6 janvier à 20 h. commencera la prochaine session du Cours Express, qui se déroulera sur six semaines (6 fois deux heures de cours pour connaître les bases de la langue et de la culture)

Lieu : 1 rue Jean Aillet, de 20 h à 22 h.

Prix : 36 € incluant l'adhésion à EKC (16 € pour les étudiants et chômeurs)

TTT = Tuluza Teatra Trupo

La TTT kunvenos la 21an de januaro por decidi sian programon por 2004 kaj 2005, kaj disdoni rolojn al la geaktoroj; estas ja planata surscenigi la aktualan teatraĵon *Un*

air de Famille de Jean-Pierre BACRI kaj Agnès JAOUÏ, en traduko de Rikardo Cash *Familia Etoso*.

Novaj geaktoroj bonvenaj.

Les voyages de l'été

« *Cet été, je recevrai ma correspondante hongroise...* »

« *Pour moi, c'est moi qui voyagerai et je rencontrerai mon correspondant au Congrès Mondial de la Jeunesse, en Russie* »

« *Eh bien moi je préfère aller à I.J.S., en Hongrie, c'est pour « ceux qui se sentent jeunes... »*

« *J'ai décidé d'aller à Pékin, où se tiendra fin juillet le Congrès Mondial d'espéranto.* »

Cette année, le choix des rencontres internationales est particulièrement vaste, il y en a pour tous les goûts, et pour toutes les bourses !

Au printemps, vous aurez le choix entre :

Paska semajno Internacia (PSI) du 5 au 12 avril à Duderstadt (Allemagne)

et **Internacia Junulara Festivalo** (IJF) du 7 au 13 avril, en Abetone, Toscane (Italie)
<http://iej.esperanto.it/ijf/2004>

En été :

Congrès International des Jeunes à Kovrov (Russie) du 10 au 17 juillet (avec les rencontres avant et après, à St Petersburg, Kiev (Ukraine) et Tcheboksari (Tchouvachie)

Congrès Mondial à Pékin du 24 au 31 juillet, avec les traditionnels avant-congrès et après-congrès touristiques, organisés par nos amis chinois.

Congrès Européen : [6-a Esperanta Eŭrop-
Unia Kongreso \(EEU-Kongreso\)](#) 25 - 29 aŭgusto, Bilbao, ESPAGNE Pays Basque

... et beaucoup d'autres, que vous trouverez sur : <http://www.eventoj.hu/2003.htm> ou à nos permanences, consultez-nous pour toutes précisions et adresses utiles).

Certains Toulousains ont déjà fait leur choix...

L'espéranto à la radio

Radio-muzika konkurso

Ekde dimanĉo 22a de decembro estis lanĉita speciala radio-muzika konkurso kunlabore inter la Esperanto-Redakcio de Radio Polonia kaj *Vinilkosmo*.

Por ĝin partopreni vi aŭskultu la dimanĉvesperan kaj lundmatenan elsendojn ĉe Pola Radio :

<http://www.radio.com.pl/polonia/audio.asp?rid=11>

Krome ni invitas vin aŭskulti intere la radioprogramon kiun ni disaŭdigos ĉiulunde ĉe Canal Sud (Suda kanalo) je la 19a h UTC (20a h.en Tuluzo !) ĉe tiu adreso : <http://www.canalsud.net>

Se vi ne sukcesas trafi la elsendojn en tiu horo vi povos trovi ilin la morgaŭon ĉe la radioarkivejo starigita de Lumulo ĉe tiu adreso : <http://radioarkivo.org>

Tie ni redisaŭdigos la anoncon de Radio Polonia kiu prezentos la konkursan regularon kun la demandoj.

Ni invitas vin aŭskulti tiujn elsendojn kaj partopreni la muzikan konkurson.

Plej muzikajn bondezirojn de la tuta
Vinilkosmo/EUROKKA teamo

Esperanto-Magazino de Tuluzo/L'espéranto sur les radios toulousaines

Tiu loka magazino estas dissendata en la franca kaj esperanto, ĉe du lokaj tuluzaj radiostacioj

Cette émission est diffusée en français et espéranto, sur deux radios locales:

Radio-occitania 98.3 jeudi 19h-20 h et sur internet : www.radio-occitania.com

Canal-Sud 92.2 lundi 20h-21h et sur internet : <http://www.canalsud.net>

Radio FMR 89.1 mardi 14h-15h (redisaŭdigo de Canal Sud)

E-Redakcio de Radio Polonia

disaŭdigas ĉiutage sian elsendon je la 13.30 h per mallongaj ondoj (laux la Universala Tempo) (41 m =7285, 7275 kHz) kun la ripetoj je 18.00 h (42.07 m. = 7130 kHz), 19.00 h (nur satelite) kaj la sekvan tagon je 08.30 h nur per satelite. (Ripeto de la programo aŭdiĝinta la antaŭan tagon).

Post la ripeto je la 8.30 la elsendo estas aŭdebla en ret-versio.

La satelita ricevo estas ebla per:

Eutelsat II F - 6 - Hot Bird - 13 gradoj de la orienta latitudo; frekfenco 11,474 GHz, polarizado horizontala (H); subportanto 7,38 MHz

La adreso por retaj aŭskultantoj:

<http://www.wrn.org/ondemand/poland.html>

Ni memorigas, ke multaj sonmaterialoj de la E-redakcio de Radio Polonia troviĝas ĉe la adreso de nia aŭstra aŭskultanto: Anton Oberndorfer: Lia retradio liveras jam de kelka tempo ankaŭ felietonojn de nia redakcio pri la sociaj kaj socialaj temoj. Siajn servojn Anton Oberndorfer vastigis per dulingva versio de iuj felietonoj - esperanta kaj germana. Uzu kaj disvastigu esperantan ret-radion!

<http://start.at/retradio>

Pourquoi adhérer à une association ?



En étant membre de UEA, vous appartenez à une communauté de langue présente dans 120 pays

Quelque soit le niveau, local, régional, national ou international, l'adhésion à une association d'espéranto est importante, afin de faire reconnaître la langue internationale. ([ci-joint un formulaire](#))

Des nouvelles de Pierre-Yves et Elodie

Ce jeune couple toulousain parti en juin dernier faire le tour du monde, est actuellement au Vietnam. Voici un extrait de leur carnet de voyage, visible sur leur site : [Dessine moi un chemin](#)

[Vietnam](#) : *Vendredi 5 décembre 2003*

...les gens sont naturels, spontanés, simples, gais, généreux. Ils travaillent beaucoup mais ils savent aussi faire la sieste. Leur langue s'apprend comme une partition de musique, avec des notes. J'aime les marchandes à vélo qui vendent des roses fraîches de toutes les couleurs ; celles qui vendent des ballons de fête mais tous les jours... Les marchands de poissons rouges qui accrochent leurs locataires, chacun son sac plastique, sur la mobylette ; les femmes qui se promènent dans la rue en pyjama fleuri ; les coqs qui deambulent devant les boutiques ; le chien grille qui se grignote sur le trottoir, le soir, assis sur un tabouret en plastique ; les maisons de dessin animé qui dressent leur pièce montée jusqu'au ciel ; un inconnu qui vous entend parler français, s'assoie à côté de vous et vous invite à prendre le thé chez lui ou il vous présente toute sa famille... Nous n'avons pas beaucoup bougé mais nous avons la sensation d'avoir vu tout le Vietnam ici. Peut-être parce que le voyage au cœur des hommes a pris ici toute son ampleur, toute sa saveur... merci encore à la clé de ces portes grandes ouvertes, merci à l'espéranto. Le Vietnam laisse une belle rose au fond de notre cœur.

Elodie

From: <pierives@wanadoo.fr>

Sent: Monday, October 27, 2003 7:19 AM

Subject: Notre voyage et l'esperanto

A ce moment du voyage, apres 5 mois de cheminement, nous voudrions rendre un hommage a cette langue qui guide nos pas, jour apres jour... Grace a elle, nous pouvons voyager au coeur des hommes.

Imaginez qu a votre arrivee dans un pays, votre oncle, votre tante, votre cousine, votre cousin vous accueille. Bras ouverts. Commence par vous offrir le the, vous propose la douche. Et puis nous commencons a partager nos envies. Les yeux s'illuminent, les coeurs s'ouvrent. Il propose de nous accompagner. Appelle ses amis pour une fete, une rencontre. Simplement, nous nous sentons profondement lies.

Grace a l'esperanto, nous avons pratique l'acupuncture en Chine, chante et calligraphie avec des ecoliers de Fukuoka, plante de l ail dans la province de Kyushu, appris la therapie Yumeiho a Tokyo, vecu dans un temple en Coree du Sud. En

ce moment, au Vietnam, chaque matin, pendant 3 heures, nous pratiquons le Khi Cong. L'apres-midi, nous approfondissons la Yumeiho. Semaine prochaine : visites de jardins medicaux.... Voici des exemples concrets de notre propre experience. En quelques jours, nous devenons acteurs, nous depassons le Dire pour Faire.

L'esperanto n'est pas une langue morte ou disparue : nous la vivons au quotidien.

L'esperanto n'est pas seulement une langue. L'esperanto, c'est un voyage au coeur des hommes

Merci a Zamenhof, createur de cette langue magique ; Merci a Bernard Martinez, celui qui nous l'a transmise.

Elodie et Pierre-Yves

(Pour nous ecrire merci d'utiliser cette adresse : pierives@wanadoo.fr)

... et de notre ami chinois Peng

que nous avons reu a Toulouse en juillet 2002

De : "peng" <dedhea@public.wh.hb.cn>

Envoye : mercredi 8 octobre 2003 02:09

Objet : de Peng

Karaj Geamikoj,

Aŭtunan Saluton!

Mi ĵus revenis de la Kvina E-kongreso de Ĉino, kiu okazis dum la semajna ferio de Nacitaga Festo (la 1-a ĝis la 7-a, Okt.), en Yanĵi, la Ĉina korea regiono ĉe landlimo inter Ĉinio kaj Norda Koreio. Ĉe la landlima rivero, per lupeo, mi klare vidis homajn aktivadojn trans la limo, kaj mia piedoj tuŝis la sekretan landliman linion...

Pli ol 230 ĉinoj kongresis tie por temo "UK kaj Ĉinia Movado". Por mi mem renkontiĝi kun amikoj estas la plej agrabla afero. Nia asocio prezidis tie la seminarion pri Tikos, tiu fama antaŭulo en ĉina movado, kiu eĉ aktivadis dum Kultura Revolucio, kaj multe faris tiel en nia urbo dum kelkdekaj jaroj...

La distanco de la vojaĝo preskaŭ egalas al nia lastsomera vojaĝo en Eŭropo (Parizo--Goteburg--Parizo)...

Peonio ne sekvis min tien ĉar ŝi havas sian studtaskon eĉ dum ferio. Ŝi sufiĉe aktive ĉeestas en sia liceo, post la jara ĉeso kaj eneŭropa vojaĝo. La kruro ankoraŭ ne re-traktitos ĝis vintra ferio. Ŝi salutas vin!

Kiel vi fartas? kun kiaj novaĵoj? ĝhis refoje, via

Peng Zhengming Wuhan, Ĉinio

Korespond-petoj

Koreio

197 studentoj de Universitato Dankook en Koreio, kiuj studas Esperanton, deziras korespondi.

Pli da informoj ĉe: <http://www.esperanto.co.kr> en la ĉambro "Libera skribo".

Eŭskio (Hispanio)

Nicolas Xil CARVALHO, (1062 postakutxa, 20080 Donostia, Gipuzkoa EH, Pais Basc, Espagne), deziras korespondi pri Okcitanio, la okcitana lingvo, la okcitana literaturo.